

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

BONDEZIRON
EN LA
NOVA JARO

JANUARO-FEBRUARO 1932

N^o-ROJ 178-179

700014-B

1932-34

Hi ha una manera indirecta de protegir a la
Federació Esperantista Catalana:

Comprar les coses que ella patrocina.

Kataluna Antologio

(segona edició)

Antologia de poetes i prosistes catalans en Esperanto. - 416 pàgines de text. - Preu: 10 pessetes.

Primer Manual de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

Edició de 4.000 follets al preu de 25 cènts. exemplar. - Comandes des de 25 exemplars, 20 % de rebaixa.

Zamenhof-disko

Disc fonogràtic amb la veu del Mestre, impressionada amb motiu del 5.º Congrés Universal d'Esperanto a Barcelona en 1909.

L'únic disc al món que guarda la veu de l'autor de l'Esperanto.

Edició única de 50 discos!

Preu: 10 pessetes. - (Despeses d'embalatge i transport apart).

Adreceu-vos a _____

CARRER VALENCIA, 245. - - BARCELONA



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245-BARCELONA

ALS NOSTRES AMICS I LECTORS

Reprenem la publicació de KATALUNA ESPERANTISTO, que uns mesos ha deixà d'aparèixer per diverses causes econòmiques, per nosaltres tan decisives en temps d'una certa crisi general.

No tornem pas a la palestra sentint cap inquietud espiritual per la manca d'empenta i optimisme per part nostra. Ambdós no ens han mancat mai. Però, sí ens cal insistir prop d'aquells amics i companys que entusiàsticament col·laboraren amb nosaltres en la celebració dels brillants Congressos i Jocs Florals Internacionals, que tanta glòria han donat al moviment català arreu del món, avui dia novament accentuada amb la reedició de KATALUNA ANTOLOGIO, esforç suprem d'un incansable nucli d'esperantistes catalans que aspiren... que aspirem donar al moviment esperantista de la nostra terra, un caire gens mesquí i ridícul, ans bé que demostris als intellectuals i autoritats de Catalunya, el que ja és avui dia l'Esperanto: una llengua culta.

Ara, doncs, emprenem de nou el camí interromput. Comptem, no obstant, amb l'ajuda econòmica d'uns amics, que en moltes ocasions han contribuït a realitzar l'infinitat d'empreses, que des de l'any 1923 ençà hem planejat. Necessitem, malgrat tot això, triple quantitat d'abonats dels que fins ara tenim, per això hem reduït la quota anual de subscripció a TRES pessetes, a l'objecte de fer el cost de l'abonament més assequible a tothom.

Hem convertit KATALUNA ESPERANTISTO en una revista mensual de vuit planes de text. Aquest any, ben a contracor, ens veiem obligats a fer-la sortir cada dos mesos, però amb doble nombre de pàgines, amb l'exclusiva finalitat d'alleugerir

les despeses de franqueig, petit estalvi que ens ajuda a eixugar, a fi d'any, el dèficit que fins ara ens ha deixat la publicació dels números anteriors de la revista.

Cal que els nostres "pioniroj" de les poblacions més importants de les terres de parla catalana secundin la "revigliĝo" que se sent ja a Barcelona, i ajudin, per mitjà de la Federació Esperantista Catalana, a fomentar l'entusiasme per a la *plasmació vivent*, creada pel doctor Zamenhof.

LLISTA DELS "AMICS DE KATALUNA ESPERANTISTO"

Enric Adam.	Antoni Codorniu.
S. Alberich Jofré.	Jacinte Comella.
Valentí Alavedra.	Delfí Dalmau.
Jacinte Bremon.	J. Font Giralt.
Eduard Capdevila.	Maurici Orriols.
Ramon Cirera.	R. Torras Carreres.

Són "Amics de Kataluna Esperantisto", aquelles persones que paguen una quota voluntària de 3'35 pessetes mensuals, o 10 pessetes trimestrals.

Tots els "Amics" tenen dret a ésser anunciats gratuïtament un cop a l'any en la revista.

Esperantista: retén curosament els seus noms.

Pressupost de "Kataluna Esperantisto" per l'any 1932:

INGRESSOS

Donatius d'"Amics de Kataluna Esperantisto" . . .	480'—
Subvenció de la "Federació Esperantista Catalana" . . .	240'—
Quotes dels abonats , , , , , , , ,	360'—
	<hr/>
Total, pessetes	1080'—

DESPESES

Impressió de 6 números de "K. E." . . . , . . . , . . .	700'—
Correspondència, franqueig, i altres	150'—
	<hr/>
Total pessetes.	850'—
Deute anterior	230'10
	<hr/>
Total pessetes.	1080'10

EN DEFENDO DE LA KATALUNA LINGVO

Sant Quintí de Mediona, 21 setembre, 1931.

Sinjoro J. O.—Zaragoza.

Kara sinjoro: Mi gratulas vin pro via partopreno en la eldonado de NIA VIVO, monata Bulteno de la Zaragoza grupo FRATECO, sed mi bedaŭras la tendencon de via artikolo EN KIUJARCENTO NI VIVAS?, aperinta en la numero 2 de tiu Bulteno.

Laŭ vi, el la Iberiaj lingvoj nur la hispana rajtas plenan honorigon kaj katalunoj, baskoj kaj portugaloj devus rezigni je la uzo de la propra lingvo, por alpreni la hispanan. Nu, laŭ tiu vojo la francoj povus postuli ke hispanoj kaj italoj forlasu sian lingvon, por alpreni la francan. Kaj poste oni ankoraŭ petus, ke oni alprenu la anglan lingvon, aŭ la ĥinan...

Ne, sinjoroj: aŭ ni alprenos nur la internacian Esperanton, aŭ ni daŭrigos la uzadon de la gepatra lingvo: tiu ĉi uzado ampleksos ĉiujn aspektojn de la homa vivo, kiam temos pri kulturlingvo, aŭ nur kelkajn intimajn aspektojn, kiam temos pri humila dialekto. Sed rezigni la propran lingvon, por alpreni alian nacian, signifas rezigni je la propra vizaĝo, por surmeti maskon.

Vi ŝajnigas kredi, ke amo de la katalunoj al sia *nacia*, ne *regiona* lingvo, estas ne inda je la moderna vivo, je la vivo *en nia jarcento*. Nu, la ekstertempuloj estas tiuj, kiuj pretendas *en la dudeka jarcento* trudi sian lingvon al aliuloj. Simile oni diris, antaŭ jaroj, ke ĉeĥoj devas alpreni la germanan lingvon keĵ poloj la rusan. Ĉu vi ne scias, ke ĝuste tial ni estas esperantistoj, ĉar ni volas la katalunan lingvon *por ni* kaj Esperanton kiel duan lingvon *por ĉiuj*? Via sinteno, sinjoro, ne estas pure esperantista...

Ĝuste hieraŭ mi finis la Esperantan tradukon de du fragmentoj de teatraĵoj el la hispana klasikeco: "Los favores del mundo" de Juan Ruíz de Alarcón kaj "La villana de la Sagra" de Tirso de Molina, aperontaj en la "Hispana Antologia" kiun mi preparas, kuraĝigite de la granda sukceso de mia "Kataluna Antologio". Mi benis la fakton, ke mi funde konas la hispanan lingvon, eĉ la klasikan, kaj admiris ravite ĝian belecon kaj grandiozecon... Sed alpreni, la hispanan lingvon, ĉu pro trudo de la ŝtato, ĉu pro senkonscio de la individuo, tion mi neniam faros.

Kion vi pensus, se la granda poeto hispanamerika, la dia Rubén Darío, estus konsilinta al la siaj la alprenon de la angla (aŭ pli ĝuste la usona) lingvo, kaj estus balbutinta en tiu lingvo, nepre fariĝinta ĵargono sur liaj lipoj, anstataŭ esti *kreinta* majstrajŭ verkojn glorie hispanajn? Li ja ne estis malmodernulo, nek unuflanka homo, nek simpla landano: en la kontinento de Monroe, li restis fidele al la hispana spirito kaj admiranto de la *sprito*,

de la genio franca. Kiam li vizitis Katalunujon, li ne montris ĵaluzon je nia amo al la Kataluna lingvo, li ja plej granda moderna kantinto en la lingvo, kiu transflugas kontinentojn...

Pripensu, sinjoro, miajn antaŭajn, konsiderojn, kaj bonvolu forlasi la facilan ironion pri la *regionaj* vestoj kaj la *regionaj* lingvoj, forigotaj same kiel la malnovaj *regionaj* mezursistemoj. Ĉu vi ne kredas, ke la naciaj lingvoj estas io pli alta ol la naciaj mezurrimedoj, kaj ke la lingvo internacia estas io pli spirita kaj signifoplena ol la mezura sistemo decimala? Ĉu vi ne kredas, ke *paroli* estas io pli grava ol kalkuli, pesi kaj mezuri?

Vi, tiel facilanime skribinta pri aferoj, se ne sanktaj, almenaŭ respektindaj, morgaŭ eble skribos pri la *interna ideo*, en tono tiel majesta kaj konfuza, ke oni ne scios, kion vi efektive pensas pri aliaj ideoj, same tiel internaj, tiel intimaj, kiel ekzemple la amo al la propra lingvo, heredita el la antaŭaj generacioj, sento tute nobla kaj atestanta pri homa solidareco tra la tempo, simila al la homa solidareco tra la spaco, kiun ni esperantistoj celas enkonduki.

Semideane via,

Jaume GRAU CASAS

Direktoro de "Kataluna Esperantisto"

PROpra INTERNACIA HEJMO ESPERANTISTA EN ASPremont (A.-M.) FRANCUJO

La Direktoro de la I. C. K. en Genevo sciigas al ni la jenon: "Post kiam la formalaj detaloj kun la aŭtoritatoj ktp. estas ordigitaj, ni povas sciigi oficiale, ke la movado nun posedas sian unuan internacian hejmon esperantistan en Aspremont (Alpes-Maritimes) en Sudfrancujo, 13 km. de Nico. Ĝi konsistas el domo kun 9 ĉambroj instalitaj (kun simpla komforto) kaj tereno de 30.569 kv. metroj. Ĝia celo estas, ebligi al ripozemaj samideanoj kaj turistoj esperantistaj libertempan restadon, dum kiu ajn sezono de 1' jaro je moderaj kostoj. Ĉar la loko estas limigita, estas necese anonci sin sufiĉe frue. Detaloj estas sciigataj per anoncoj kaj informoj en la Esperanto-gazetaro. Gvidantoj de la Hejmo estas Gesinjoroj E. E. Yelland el Londono."

Detalajn informojn pri la restado oni ricevas kontraŭ 1 respondkupono de "*Internacia Hejmo Esperantista*" (*Nia Civito*), *Aspremont (Alpes-Maritimes), Francujo*.

La entrepreno, kiu estas proprajo de la movado, estas ekspluatata sub la aŭspicioj de la I. C. K.

L'ESPERANTO MARXA

Cannes. — L'Ajuntament d'aquesta ciutat ha implantat l'ESPERANTO com a segona llengua en totes les indicacions d'encreuaments de camins o carreteres.

El diari francès *Excelsior*, ha fet un merescut elogi d'aquest acord, al mateix temps que publicava una foto d'un dels pals indicadors.

La Haia.—El Ministre d'Instrucció Pública d'Holanda ha decretat que l'ESPERANTO, subvencionat ja per l'Estat, sigui un estudi facultatiu en les escoles de comerç.

La Haia.—L'Oficina Internacional pro Premsa Pacifista, fa aparèixer una informació especial, que difon les ressenyes més importants sobre el moviment pacifista d'arreu el món, en les llengües francesa, alemanya, anglesa i ESPERANTO.

Ljubljana.—L'Institut de Meteorologia i Geodinàmica de Iugoeslàvia, publica un volumet que conté el resum de les observacions meteorològiques, fetes durant els anys 1923 i 1924. Els títols de les observacions alludides són traduïts en ESPERANTO, com també, però íntegrament, un article sobre temes hidrogràfics.

Milà.—Sota els auspicis del Touring Club d'Itàlia, entitat amb més de 400,000 associats, ha aparegut una guia sobre els llacs de Lombardia i la ciutat de Milà, exclusivament redactada en ESPERANTO. Aquesta guia és a semblança de les famoses "Guides Bleus", "Baedeker", etc.

Praga.—El Ministeri de Ferrocarrils Txecoslovacs, ha publicat un llibret, bellament il·lustrat, titulat "Monografia dels Ferrocarrils Txecs de l'Estat", totalment redactat en ESPERANTO.

Estocolm. — El Parlament suec, novament ha acordat, per unanimitat, subvencionar amb 2.900 corones els cursos d'ESPERANTO per a mestres. En prendre l'acord, es féu constar els èxits obtinguts durant els cursos del passat estiu.

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO

La *Internacia Sciencia Asocio* jús publikigis broŝuron entenantan la *Sciencan Fundamenton*, aperintan laŭ sinsekvaj partoj en ĝia Bulteno dum la lastaj monatoj.

Tiu 100-paĝa broŝuro enhavas tekston, kiu prezentas elementan didaktikan rezumon de la matematikaj, fizikaj kaj naturaj sciencoj, kun laŭalfabeta tabelo de la vortoj.

La samideanoj, kiuj deziras aĉeti tiun verkon, ne prokrastu mendi ĝin al S-ro ROUSSEAU, 2, rue Alfred de Vigny, Béconles-Bruyère (Seine) France, sendante samtempe la prezon t. e. 1 dolaron aŭ samvaloran ŝumon.

CATALANS!

Catalans que serveu viva
vostra llengua nacional,
que dels trobadors encara
té la glòria medieval;
que a través de tots els segles
féu florir per sempre l'art;
Catalans, amb simpatia
us adreça el món l'esguard.

Catalans, la pròpia llengua
és del poble el gran tresor:
hi batega nostra vida,
l'amor nostre, el nostre cor.
No vengueu la llengua vostra
per un ídol estranger!
Catalans, rera la llengua
prompte el poble mor també.

Catalans, molts de vosaltres
en exili van caient,
o en presó, mes vostra causa
la fa santa el sofriment.
Vostra sort, vostre pervindre
Déu tan sols els té en la mà.
Catalans, no tremoléssiu
per un dèspota i tirà.

Catalans, tingueu coratge!
El futur es va acostant:
sobre els seus fonaments febles
el vell món es va esberlant.
A l'orient, per a vosaltres
surt un sol de llibertat!
Catalans, totes les terres
tenen lloc assenyalat!

Catalans, la vostra pàtria
no té estat independent,
que sols és avui factible
per un gran esforç cruent!
Doncs la llibertat guanyeu-vos
i que cessi el vostre afront.
Catalans, no us oblidéssiu
que us esguarda tot el món!

KATALUNOJ!

Katalunoj, kies lingvo
en la ora mezepok'
el la buŝ' de l' trobadoroj
sonis ja en ĉiu lok';—
kies artoj gloire brilas
tra la tuta histori',
Katalunoj, vin rigardas
tuta mond' kun simpatí'!

Katalunoj, propra lingvo
estas de popol' trezor';
en ĝi batas ĝia vivo,
ĝia amo, ĝia kor'.
Ne vendaĉu vian lingvon
kontraŭ fremda ja idol'!
Katalunoj, post la lingvo
baldaŭ mortas la popol'!

Katalunoj, el vi multaj
en ekzilo aŭ karcer'
ĝemas, sed aferon vian
ja sanktigas la sufer'!
Vian sorton kaj estonton
tenas Dio en la man',
Katalunoj, sed ne tremu
pro despoto, pro tiran'!

Katalunoj, kuraĝiĝu!
Firme fidu je l' estont':
sur malfortaj fundamentoj
krakas la malnova mond'!
Por vi ankaŭ oriente
sun' leviĝas de liber'!
Katalunoj, ĉiu gento
rajtas lokon sur la ter'!

Katalunoj, patrolando
via ja ne estas ŝtat',
kiu estas nur vivebla
per perfort', persekutad'!
Luktu por libero via.
kun persisto, kun obstin'!
Katalunoj, ne forgesu,
ke la mond' rigardas vin!

Jan VAN SCHOOR

HISPANA ESPERANTISTA KONFEDERACIO

La 12-an de oktobro kunvenis en Zaragoza la reprezentantoj de Orienta, Astura, Aragona kaj Kataluna Federacioj kun la celo starigi tutlandan Konfederacion. Nia malnova amiko kaj samideano Sro. Maynar, kiu tiel longe bataladis por la ideo, fine vidas ties efektiviĝon. Al lia laboremo kaj pacienco ni ŝuldas multon.

En la nomo de KEF. ĉeestis Sroj. Alberich kaj Gili. Niaj reprezentantoj, kiujn akompanis la sekretario de KEF. Sro. Capdevila, trovis ĉe ĉiu sugesto komprenemon kaj sinceran fratecon. Oni ne miru, do, ke KEF., kiu sentis sin tiel malproksime de Hispana Esperantista Asocio, starigis apud la Konfederacio kun la plena deziro kunlabori kaj helpi.

Certe la situacio de nia movado ne estas vigla nek potenca kaj sekve el la kunfandiĝo de ĉies fortoj ne naskiĝos miriga organizaĵo sed ni estas pretaj labori kaj batali kun fervoro kaj energio.

Laŭ la regularo de la Konfederacio la membroj de la aliĝintaj Federacioj devas pagi ĉiujare 0.60 ptojn. Sekve tiun sumeton ni aldonos al la KEF-a kotizaĵo.

AL TUTMONDA ESPERANTISTARO!

Estimataj Gesamideanoj!

Ni, ukrainaj esperantistoj veturante Krakovon por partopreni XXIII-an Universalan Kongreson de Esperanto, pensis kaj kredis, ke ni veturas Esperantujojn (Universalajn Kongresojn oni nomas Esperantujo), kie ĉiuj gesamideanoj estas egalrajtaj kaj kie regas homamo kaj trateco!

Sed bedaŭrinde, nia "bela sonĝo" de l' homaro" malaperis dum XXIII-a Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo. La Estraro de la Kongreso malpermesinte al ni saluti la Kongreson en la nomo de Ukrainaj Esperantistoj, faris ion tute kontraŭan al vera interna Ideo de l'Esperantismo, kaj devigas nin kredi, ke Esperantujo vivis nur en la koro de Nia Majstro,—post Lia Morto ĝi ne ekzistas por hodiaŭaj gvidantoj de esperanta movado.

Kun Samideanaj Salutoj,

Delegitaro de Ukrainaj Esperantistoj por XXIII-a Universala Kongreso de Esperanto: *Tadeo Skotynskyj, Prof. Orest Kuzjma, Ivan Ĉerkavskyj.*

* * *

Ni malaprobas la uzitan procedon kontraŭ tinj-ĉi ukrainaj esperantistoj.

Kio estas Esperanto; afero lingva aŭ ŝtata? Ni esperas, ke la Oficialaj Institucioj de nia movado scios siatempe eviti, en la estonteco, similajn maljustaĵojn.

STRATO DOKTORO ZAMENHOF

Dank' al la klopodoj de Kataluna Esperantista Federacio, oni sukcese atingis de la Barcelona Urbestro, ke ĝi donu la nomon de Doktoro Zamenhof al nova strato, ĉe nova urba kvartalo. Ĝi troviĝas en la proksimeco de la eks-reĝa palaco kaj iras de "Avenuo de la 14^a de Aprilo" ĝis "Carretera de Sarrià" (200 metrojn longa), loko ĵus planigita kaj inaŭgurita kun promesplena estonteco.

Kataluna Esperantista Federacio dankis la urbestaron kaj proponis al ĝi ke ni konstruos niakoste la nomtabulon, ĉar ni volas profiti la okazon por publike honorigi Doktoron Zamenhof. La tabulo estos el marmoro kun la portreto de la Majstro. La urbestro afable akceptis kaj konsentis.

Kataluna Esperantista Federacio tuj malfermis monkolekton inter la barcelonaj esperantistoj. Bedaŭrinde la terura krizo ĉie reganta malhelpis, ke la sukceso de la kolektado estu tiel brila kiel ni dezirus. Malgraŭ tio, ni ne dubas ke ĉiuj restos kontentaj, ĉefe ĉar ni trovis la malavaran helpon de la desegninto de la tabulo, nia karega amiko S-ro J. Comella kaj ankaŭ tiun de la marmorskulptisto, nia malnova samideano S-ro A. Barba, kiuj eblistis ke la nomtabulo estu vere bela.

La oficialan inaŭguron ni anoncos per la ĵurnaloj kaj ni esperas ke ĉiuj katalunaj samideanoj bonvole akompanos nin en tiu solenaĵo. Ankaŭ oportune la Komitato de K. E. F., donos ĉiujn detalojn pri la monkolekto kaj elspezoj.

Ni finas esprimante nian koran dankon al ĉiuj, kiuj monhelpis kaj ankaŭ speciale al la Brita Asocio, Itala Federacio, Flandra Ligo, Hispana Konfederacio, Universala Esperanto-Asocio, Internacia Centra Komitato, kaj multaj konataj esperanto-pioniroj, kiuj gratule skribis al la Barcelona Urbestro okaze de tiu ĉi nova sukceso de Kataluna Esperantista Federacio.

KORESPONDADO

J-E. Fedillo en Bléré (Mdre. et Loire), rue du Gozomètre. Responde al via let. de 10 Aŭgusto-1931, bonvolu vin turni al ĉi-tienj francaj societoj. Ili povos liveri al vi ĉiajn ajn hispan-korespondantojn. Dankon por viaj deziroj al nia lando.

H. W. Green, 53 High street, Stoke-Trent, Anglujo. Ni transdonis vian leteron al ĉi-tiea grupo. Tamen, por via celo, faru novan peton, sed nur al U. E. A.—delegito ekster Barcelona.

Internationaal Persbureau, Postbus, 74, Utrecht, Nederlando. Estas al ni malfacile esplori la nombron de hungaroj loĝantaj en Barcelona.

Turnu vin al "Consulado Real de Hungría", D. Udo de Ruttkaj, Av. 14 d'April, 359-a.

BIBLIOGRAFIO

Per Balono al la Poluso. La libro pri Andrée kaj liaj kamaradoj. Eldona Societo Esperanto, Stockholm, 1930. Libro 416-paĝa, formato 15 x 22'5 cm., bonega papero, multaj gravuraĵoj. Prezo: 9 svedaj kronoj.

La polusekspedicio de Andrée en 1897 konsistis el S. A. Andrée, Nils Strindberg kaj Knut Fraenkel. Ili mortis, eble pro la frostoj, en oktobro 1897, kaj iliaj kadavroj estis trovataj sur la Blanka Insulo, en la somero de 1930, de Sveda Societo por Antropologio kaj Geografio.

La interese kaj emociiga libro "Per balono al la poluso" estas eldonita sur la bazo de la notaĵoj trovitaj ĉe la kadavroj de la kuraĝaj esploristoj, kaj kelkaj el la fotografiaĵoj de tiu verko, estas faritaj de la ekspedicio Andrée. Post 33 jaroj oni deĉifris la difektitajn notaĵojn kaj faris, per specialaj kemiaj procedoj, la riveladon de la kliŝoj.

"Per balono al la poluso" samtempe aperis en 12 lingvoj, inter ili la Esperanta danke al la fervoroj de la svedaj esperantistoj, kiuj per tia eldono ne nur honoras la svedan nacion, sed favoras la internacian lingvon. Dankon kaj gratulon al ili, kaj precipe al la tradukinto S-ro Stellan Engholm.

Neeble estas priskribi la sentojn, kiujn oni spertas legante tiun verkon. Oni admiras la heroecon de la ekspedicio Andrée, fluginta per balono al la poluso... en la jaro 1897! Oni ĝue lernas, el scienca vidpunkto, ĉar la verko estas populare skribita. Oni sentas la poezion de la naturo: la solecon, la silenton, la glacieron, ĝis venas la tragedio: la morto en la polusaj regionoj de tiuj grandaj homoj, kiuj volas konkeri la mondon, kiuj oferas sian vivon por la scienco, kiuj pardonigas al la homaro la honton de tiom da aliaj mortoj kaŭzitaj ne de heroeco, sed de krimo.

Andrée kaj liaj kunuloj estis forflugintaj al la poluso, kaj preskaŭ nenion oni sciis pri ilia sorto ĝis kiam la 6. aŭgusto 1930 trovis iliajn restaĵojn la norvega ekspedicio per la ŝipo "Bratvaag", ekipita por scienca esploro kaj kaptado de fokoj.

La Andrée-libro estas aparte alloga pro la emocio, kiun oni sentas, legante la vortojn mem de la esploristoj, skribitajn tagojn, eble horojn, antaŭ ilia morto.

La apero de "Per balono al la poluso" estas unika okazo en la esperanta bibliografio, kaj certe ĉiu serioza samideano devas posedi tiun libron.

Lea Kantaro. Kolekto de proletaj, batalaj, liberpensulaj kaj popolaj kantoj. Tria eldono. Eldonis: Laborista Esperanto-Asocio por la germanlingvaj regionoj, Berlin 1931. Prezo: 0,40 gm.

80-paĝa volumeto kun multaj bone tradukitaj kantoj. Aparte ni ŝatis la mallongan sed esprimoplenan "Mallibereja kanto".

Pri la Prononcado de Esperanto, de Ludw. Krysta. Mondlingvo-Eldonejo, Katowice 1931. Prezo: 0,40 sv. fr.

Volumeto 32-paĝa, ĝenerale bone pritraktanta la temon. Sed mi miras, ke la aŭtoro kritikis ke oni legas la mallongigon I. C. K. tiel: IcoKó. Ni kredas, ke estus devige legi icóko se la mallongigo estus skribata ICOKO, sed ĉar ĝi estas skribata I. C. K. oni rajtas simple legi la tri literojn, unu post alia. Cetere, tio estas malgraŭvajo tute ne atentinda.

Baha'ŭ'llah kaj la Nova Epoko, de D-ro. J. E. Esslemont. El la angla originalo tradukita de Lidja Zamenhof.

Tiu ĉi libro enkondukas en la pensmanieron de nova epoko. Ĝi prezentas praktikan vivkoncepton, kiu interpacigas tradiciajn spirite-religiajn kulturvalorajn kun moderne-sciencan pensadon. La traduko de tiu verko, farita de la filino, de Zamenhof, estas tiom valora kiel la traduko de la "Biblio", farita de la Majstro. Ĉefdeponejo estas la Librofako de "Heroldo de Esperanto", Köln, Brüsseler Str. 94, Germanujo. La amplekso de la libro estas ĉirkaŭ 200 paĝoj en formato 15,5 x 23,2 cm. La prezo pro la bone presita kaj plaĉe aranĝita libro estas gmk. 4,40, inkluzive sendkosto.

Jaume GRAU CASAS.

Ni represas ĉi-sube cirkuleron de I. C. K. kiun oni sendis al ĉiuj esperanto-organizaĵoj.

GRAMOFON-DISKOJ KUN LA VOĈO DE D-RO ZAMENHOF

Tiu ĉi disko laŭ malnova fonografa cilindro estis pena eksperimento, kiu sukcesis sufiĉe kontentige, se oni konsideras la grandegajn malfacilaĵojn teknikajn. Por kovri la kostojn de la eksperimento K. E. F. eldonis nur 50 diskojn.

Por helpi al niaj katalunaj amikoj ni aŭdigis la diskon en la Kongreso de Krakovo. Sed spite al ĉiu klopodo K. E. F. ne trovis ĝis nun aĉetantojn por la malgranda kvanto. La prezo de nur 10 pesetoj po disko (plus la send— kaj pak-elspezoj) je la nuna kurzo de l'hispana valuto estas kosto, kiun, ĉiu vera esperantisto povos oferi por havigi al si tian veran relikvon de Esperanto. Sen la klopodo de niaj katalunaj amikoj la voĉo de l' Majstro estus perdisinta eble por ĉiam. Ili oferis konsiderindan sumon por eviti tion. Ili ne petas pri monkolektado, sed ili certe rajtas, ke iliaj elspezoj estu kovrataj per la vendado de la malgranda provizo.

Ni petas konigi tiun ĉi alvokon al personoj povantaj helpi en tio. Ili povas esti certaj pri nia danko kaj tiu de niaj katalunaj samideanoj.

Por mendoj aŭ informoj oni sin turnu al Eldona Fako de Kataluna Esperantista Federacio, carrer València, 245, Barcelona.

ENLANDA KRONIKO

Barcelona.—La grupo "Acadèmia Enciclopèdica Espero", organizis esperanto-ekspozicion kaj propagandajn paroladojn ĉe "Ateneu Obrer Martinenc". Dum kelkaj tagoj multaj personoj atente vizitadis la ekspozicion kiu altiris multnombrajn fervorajn simpatiantojn.

La 20-an de Novembro, okaze de la inaŭguro de tiu-ĉi ekspozicio, oni aranĝis propagandan vesperon kun diversaj amuzajoj. Urbkonsilanto Sro Joaquim Xirau Palau faris favoran paroladon por Esperanto, kiu meritis varman aplaŭdadon de la ĉeestantoj. Ĉe la fino de la festo, Sro Jaume Grau Casas, L. K., longe raportis pri la lastaj sukcesoj de Esperanto en ĉiuj medioj, kaj, per konvinkaj vortoj, li konstatis la aŭdantaron pri la kultura fakto kia estas jam Esperanto.

— La 15-an de Decembro, la grupo "Barcelona Stelo" okazigis kun neriproĉinda aranĝo la Feston de la Libro.

Ĉeestis reprezentantoj de multaj grupoj de Barcelona, kiuj kune kun la Prezidanto de K. E. F. kaj "Barcelona Stelo" prezidis la feston. Ankaŭ Grupo Esperantista de Bilbao sendis salutan telegramon. Post diversaj deklamoj kaj salutparoladoj, Sro Rodellar, prezidanto de la organiza grupo, adiaŭis per dankplenaj vortoj la reprezentitajn societojn kaj ceteran ĉeestantaron.

—Sro. Cassià Costals, unu el la organizintoj de la Kongreso en Girona, estis nomita konsilanto de la Por-kultura Konsilantaro de la Registaro de Katalunujo. Tiu Por-kultura Konsilantaro celas enkonduki modernajn metodojn en la instruadon kaj klerigadon ĉe la lernejoj kaj Universitato de Katalunujo.

Ni esperas uzi la esperantemon de Kultura Registrarano Ventura Gassol, al kiu multe helpos nia kara samideano Cassià Costals por atingi oficialan subtenon de Esperanto.

— Nova komitato estis elektata ĉe la ĝenerala kunveno de "Barcelona Stelo", okazinta la 25-an de Januaro.

Prezidanto, Josep M.^a Coll; vicprezidanto, Manuel Palomera; sekretario, Ramon Moret; vicsekretario, Lluís Garcia; kasisto, Alfred Rúbio; kalkulisto, Manuel Rodellar; bibliotekistino, Rosa Forment; voĉdonantoj, Joan Gili, Eduard Capdevila, Vicens Andrés kaj Jaume Moret.

Ni petas ĉiujn grupojn bonvolu sendi al ni regulajn sciigojn pri esperanto-kursoj kaj propagandaj vesperoj.

Ne manku al ni viaj informoj!

Esperantistes de parla catalana:

Ens cal la vostra col·laboració per mantenir l'estructuració actual del moviment esperantista.

Adheriu-vos, doncs, a la

Federació Esperantista Catalana

i a la vegada feu-vos abonats del seu òrgan oficial

Kataluna Esperantisto

Per a ésser soci de la Federació cal pagar la següent quota: 1'80 pessetes a l'any els federats que perteneixin a un grup esperantista organitzat.

3'10 pessetes a l'any els isolats. (Individus no agrupats).

La Federació Esperantista Catalana paga, per cada un dels seus adherits, 60 cèntims a l'any a la Confederació Esperantista Espanyola, de recent fundació.

Suscripció a la revista Kataluna Esperantisto val 3 pessetes a la Península i 4 pessetes per a l'estranger.

Envieu l'import de les quotes per gir-postal o en segells de correus a l'adreça de la Fed. Espta. Catalana:

Carrer València, 245. - - Barcelona

Hi ha una manera indirecta de protegir a la
Federació Esperantista Catalana:

Comprar les coses que ella patrocina.

Kataluna Antologio

(segona edició)

Antologia de poetes i prosistes catalans en Esperanto. - 416 pàgines de text. - Preu: 10 pessetes.

Primer Manual de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

Edició de 4.000 follets al preu de 25 cènts. exemplar. - Comandes des de 25 exemplars, 20 % de rebaixa.

Zamenhof - disko

Disc fonogràfic amb la veu del Mestre, impressionada amb motiu del 5.º Congrés Universal d'Esperanto a Barcelona en 1909.

L'únic disc al món que guarda la veu de l'autor de l'Esperanto.

Edició única de 50 discos!

Preu: 10 pessetes. - (Despeses d'embalatge i transport apart).

Adreceu-vos a _____

CARRER VALENCIA, 245. - - BARCELONA